

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ lokakuu ♦ oktobro ♦ 5/2008



Fransūaz Rošet kantas en Turku. Raportoj pri ŝia turneo sur paĝoj 6-9.

Fransūaz turneis en la fabela lando, p. 6

Aŭtunaj Tagoj, p. 10 ♦ Valamo-kursoj, p. 14

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ mmakita@utu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 050 365 0037 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 20 e/vuosi/år/jaro

Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*

Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Viceprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatku 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

Börje Eriksson, Keiturintie 274, 16510 Luhtikylä. ☎ (03) 785 1191 ✉ esperarto@phnet.fi

Taneli Huuskonen, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli@poczta.onet.pl

Jukka Laaksonen, Orimuskatu 79 B 4, 33580 Tampere. ☎ (03) 2554 724 ✉ jvaleto@kolumbus.fi

Paula Niinikorpi, Männistöntie 8 C 29, 28120 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Teuvo Alavillamo, Leväsjoentie 535 C, 29810 Siikainen. ☎ 040 536 9728 ✉ fantomo@jippii.fi

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ 050 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@kotikone.fi

Vilorg Teräväinen, Kaunisharjunpolku 3 E 61, 15800 Lahti. ☎ (03) 734 3978 ✉ vilorg@elmi.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): Sampo 800017-230825.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)


Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Officejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avooinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Internet: <http://www.esperanto.fi>





Kion ni volas videbligi

En la Aŭtunaj Tagoj en Heinola nia dimanĉa kulturtemo estis, kio videblas al internacia esperantlingva publiko el la Finnlanda kulturo. Por komenci, ni iris enmense en kinejon kaj antaŭ hejman televidilon, rememorigante al ni kiajn filmojn, el kiuj landoj, ni vidis. Kion ni scias pri la kinoarto de diversaj landoj. Kiel estis atendeble, horizontala interŝanĝo de kinoarto ne estas tre vigla. Ĉu temis pri francaj, ĉu nordlandaj, ĉu rusaj filmoj – nur malplimulto memoris iun viditan en lastaj semajnoj aŭ monatoj, aŭ entute. Eĉ kiam temas pri grandaj produktoj de kinoarto, kiel Bharato (Hindio), la plej granda kino-lando en la mondo, aŭ ekz-e Brazilo, ni apenaŭ vidis. – Sed demandita, ĉu kaj kiam ni vidis filmon usonan, neniu povas ne memori iu(j)n. Interŝanĝo de arto malmultas horizontale, inter kulturoj malgrandaj, kaj eksporto – aĉetado abundas vertikale – kaj en tiu vertikaleco Usono pintas.

Dua parto de la antaŭtagmezo aktivigis la partoprenantojn nomi siajn favoratojn. Oni havis antaŭ si paperon kaj la taskon: Kion vi volus konigi pere de esperanto al eksterlandanoj, al internacia publiko el la Finnlanda kulturo? Bonvolu nomi ion kaj iun, unu aŭ kelkajn. Temas pri arto larĝe, ĉu literaturo, ĉu muziko aŭ filmo, ĉu pri pentroarto ktp. Kaj grave: Vi ne bezonas esti realisto! Ni rajtas imagi, se ne staton post "fina venko" kun la mondo esperantigita, almenaŭ senliman buĝeton kaj homfortojn disponeblajn.

La tasko estis inspiriga! Meritas apartan raporton kaj analizon la respondoj kolektitaj, kaj tian ni esperas en iu el sekvaj numeroj de Esperantolehti kaj ankaŭ eksterlande doni. Por ion ĉerpi: En trideko da respondoj estis preskaŭ sesdeko da artistoj menciitaj. Kelkaj kelkfoje, sed neniu tre multe; Eino Leino, Aleksis Kivi, Arto Paasilinna, Juhani Peltonen estis verkistoj pli ol unufojaj. Kalevala – sed estas jam aperinta! – ja, sed temas pri la Hunda Kalevala, de Mauri Kunnas, la bonega desegnisto kaj verkisto por infanoj. Aparte finnaj kuriozaĵoj inter la menciitoj estas Joulupukki kaj Jaakko Teppo.

Ni aŭdis de eksterlando deziron de nova eldono de la unua romano el la finna, Sep fratoj de Kivi. Kiam temas pri eldonado, ni bedaŭrinde renkontas la postulojn de realismo. Sesdekon da verkistoj ni ne povas eldoni, sed eble tamen rehavigi Kivi kaj – kompili, traduki kaj aperigi Finnan Antologion.

Tuomo Grundström

Fine de septembro ni kaj niaj eksterlandaj amikoj sciigis el Finnlando pri io tre kontraŭa al la celoj kaj streboj de humanisma movado kia estas la nia. Mallumo ekreginta unu homon estingis vivon lian kaj tiun de dek aliaj. Ni partoprenas la konsternon kaj funebbron.

Finnlando en bezono pri eksterlandanoj

Finnlando, kiel multaj industriaj landoj, proksimiĝas problemon pri pensiuliĝantaj homoj en proksimaj jaroj. En Finnlando la fenomeno estas precize nun pli aktuala ol en aliaj landoj, ĉar ĉi tie antaŭ 60 jaroj naskiĝis escepte granda kvanto da homoj. En Finnlando en fino de la 1940-aj jaroj naskiĝis pli ol 100 000 beboj ĉiun jaron, el kio la kvanto dum la sekvaj jardekoj malkreskis al 60 000. Nun la cifero ne plu malkreskas, la jara naskiĝkvanto jam de komenco de la 70-aj jaroj stabiligis en la nivelon de 60 000, sed la diferenco de la niveloj signifas, ke nun en Finnlando ĉiun jaron pensiuliĝas pluraj dekmiloj da homoj pli ol kiom junuloj venas en laboron.

Jam longan tempon la temo, kiel plenigi tiun truon en laboranta popolo, estis en politikaj diskutoj. Ekzistis iom da strebo kreskigi la kvanton da naskiĝantaj beboj, sed ekonomiaj ebloj de la ŝtato por mone subteni familiojn en farado de infanoj estis limigitaj, kaj la kvanto de naskiĝoj ne facile sekvas la mone subtenatan celon. Se majoritato de homoj nur konstatis, ke unu aŭ du infanoj sufiĉas por ili, la decidon ne multe povis ŝanĝi mono. Ĉiukaze nun la multiĝo de naskiĝkvanto definitive jam nenion helpus, ĉar infanoj naskiĝantaj nun venos en laboran vivon maljam post du jardekoj, kaj antaŭ ol tiam oni jam devos en alia maniero solvi la situacion.

Restas tri evidentaj rimedoj: oni povas altigi la aĝon, kiam homoj transiras al pensio, oni povas malaltigi la aĝon, kiam junaj homoj komencas labori, aŭ oni povas logi eksterlandajn laborantojn en la landon. Almenaŭ la unuan rimedon oni celkonscie uzas, la ŝtato aŭtune 2003 novigis leĝon pri pensioj, per kiu oni celas, ke homoj restus kelkajn jarojn pli longe en laboro. Pri la dua rimedo ekzistas multe da parolo kaj oni ankaŭ novigis la leĝon pri monaj sub-

vencioj de studentoj tiel, ke ĝi nun celas instigi studentojn ekzameniĝi pli rapide. Samtempe oni tamen celas ankaŭ havi pli bone kaj longe edukitajn laborantojn por bezonoj de la moderna mondo. Ŝajnas, ke ne estas multaj ebloj igi junulojn fini siajn studojn pli frue por komenci laboradon en pli juna aĝo.

Verŝajne la plej rapida kaj efika rimedo, almenaŭ en mallonga perspektivo, estas havi novajn laborantojn el eksterlando. En tiu aspekto Finnlando ankoraŭ antaŭ kvar jardekoj estis tiu, kiu donis laborforton al Svedio, tiam sveda industrio je granda parto funkciis per finnaj laboristoj. Nun la kvanto da eksterlandanoj loĝantaj en Finnlando kreskas relative rapide, kvankam ilia kvanto ankoraŭ estas malgranda en komparo kun aliaj okcidenteŭropaj landoj. En Finnlando en fino de jaro 2007 loĝis ĉ. 133 000 eksterlandanoj, t.e. 2,5% el la loĝantaro, kaj ilia kvanto kreskis je ĉ. 11 000 personoj dum la jaro.

Stranga fenomeno en la finna politiko pri eksterlandanoj tamen estas, ke samtempe kiam oni multe parolas pri bezono de laboristoj, oni tamen vidas la eksterlandanojn loĝantajn en Finnlando esti ĉefe ŝarĝo por la sistemo de sociala prizorgo. Multaj eksterlandanoj venis kaj ricevis permeson resti, ĉar ili estis rifuĝintoj aŭ, speciale el Rusio, ĉar ili havis finnan devenon en parenkaro kaj tial estis konsiderataj reenmigrantaj finnoj. Problemo por multaj el tiuj homoj estas, ke la finna sistemo ne agnoskas ilian edukon ricevitan en la eksa hejmlando.

Ŝajnas, ke Finnlando estas iom aroganta en sia kredo pri la supereco de sia propra edukistemo. Certe tiu kredo ne estas tute sen bazo. Ni



ja scias pro internaciaj esploroj, ekzemple kaj speciale pro PISA-esploroj, ke la finnaj lernejoj estas bonkvalitaj. Sed tio ne signifas, ke eduko el ekzemple Rusio aŭ iu lando de Sud-Azio havus nenian valoro ĉi tie. Multaj, kiuj venis rifuĝintoj el subevoluintaj landoj aŭ pro finna deveno el Rusio, havas longan studadon post si kaj volus utiligi ĝin en sia propra profesio ĉi tie, sed estas nun en laboro, kiel purigistoj, busŝoforoj aŭ stokejstoj, kie ili produktas ekonomian valoron nur tre malefike kompare kun la kapabloj de, ekzemple, kuracisto, inĝeniero aŭ esploristo, aŭ en la plej malbonaj kazoj eĉ sidas sen laboro.

Povas ŝajni paradokse, ke oni multe parolas pri manko pri laboristoj samtempe, kiam ekzistas ankaŭ dekmiloj da finnoj senlaboraj. Ĉiu senlaborulo tamen havas propran individuon situacion kun siaj kaŭzoj por sia senlaboreco. Speciale en altnivele teknologiaj ginta lando estus ne saĝe postuli alte edukitajn homojn preni per ajnaj kondiĉoj alian laboron ol adekvatan kun la eduko. Spertoj montras, ke en industria lando ĉiam restas kelkprocenta cifero de senlaboreco, nur marĝena parto el senlaboruloj povas esti ĝuste akuzataj pro ne voli labori. Do, paradokso de samtempa manko pri laboristoj kaj senlaboreco ne estas vera.

Pli vera paradokso estas, se en lando estas bezono pri laboristoj kaj eksterlandanoj sen ĝustaj laboroj, du aferoj ambaŭ formantaj kreskantan problemon, kaj oni ne vidas, kiel unu problemo povus esti solvo de la alia – parta solvo almenaŭ. Lingvaj baroj povas esti malrapidilo, sed ne malebligilo, kaj kulturaj diferencoj povas signifi, ke profesiulo bezonas plenigan edukadon en sia nova lando, sed tio ne signifas, ke la eksterlanda eduko estus nura rubaĵo.

Mikko Mäkitalo

Estraro kunsidis

La kunvenon 30.8. ĉeestis sep kaj forestis tri estraranoj kaj vicestraranoj. Pri financoj interalie bone, ke la asocio sendinte raporton al la imposta oficejo povas daŭre trankvili pri impostoj; ni ne devas pagi; malbone, ke por ĉi tiu jaro ni ne sukcesis akiri, malgraŭ reklamacio, subtenon de opini-gazeto; bone, ke kompensas malavara mecenato.

La abonprezo de aparta Esperantolehti estis altigita je 2e al 22e. Ankaŭ membrotizojn oni decidis pridiskuti en sekva kunveno. Fruaj pagantoj ĝuas nunajn kotizojn...

– Estis planitaj kaj deciditaj la finaj detaloj pri la turneo kaj Aŭtunaj Tagoj.

– Estis informite ke kurso en Valamo jam certas por venonta jaro.

– La novan DVD-filmon “Esperanto estas ebla” la estraro decidis mendi 100 ekzemplerojn; ĝi estas multlingva, ankaŭ finna, kaj bona kiel informilo. Konvenas kiel donaco, kaj al la donacanto ne multe kostas: La detala prezo apenaŭ superos kvin eŭrojn.

– En la UK en Roterdamo EAF prezentiĝis en la Movada Foiro. Sed al la granda evento Eŭropa Socia Forumo ni bedaŭrinde ne povis sendi reprezentanton, estis samtempa kun AT.

– Ĝojiga estas progreso de retejo *lernu!*, en kiu konstruiĝas kaj daŭre ampleksiĝas finna-esperanta-finna vortaro. La propra vortarprojekto de la asocio estis diskutita – ĝi estas “eterna”.

TG

Ĝustigo

La bildon en EF 4/2008 pri Jaroslav Lych en la karavana buso el Roterdamo fotis Merja Uotila. Pardonpeto pro la forgeso en la bildoteksto.

TO

Kun Fransŭaz Roŝet en la fabela lando

Antaŭhierau, merkredon mi vojaĝis al Turku, ĉar la Esperanto-Societo en Turku aranĝis muzikan vesperon. Mi scias, ke la klubo en mia naskiĝurbo scipovas aranĝi bonajn kunvenojn, ke ĝi havas ne nur muzikemajn sed ankaŭ muzikantajn membrojn. Ĉi-foje estis kroma, eksterordinara allogo: gastas la francino Fransŭaz Roŝet (Françoise Rochette, konata el Duoble Unu), kiu tie kantas kaj akordionos.

Je la 18-a kaj duono mi sidis en salono de la Muzika Instituto, legis la ĵus ricevitajn programfoliojn kaj rapide kalkulis, ke ĉi-koncerte ni aŭdos almenaŭ dek diversajn lingvojn. (Fransŭaz ankoraŭ muzikos dum septembro en 8 aliaj lokoj en Finnlando. Pri tiuj vidu liston de EAF.)

La folio estas presita sur verda papero, kaj la programo portas la titolon “Tra la mondo – Maaĵilman ympäri”. Se kredi miajn okulojn, rolos en la programo minimume ĉi tiuj lingvoj: la internacia (alinome muziko), Esperanto, la franca, itala, cigana, greka, ladina (ankaŭ no-

mata jud-hispana), turka, armena, jida, fantazia, iu barata (hinda) lingvo, ĉina, rusa kaj finna. Mi verŝajne forgesis unu-du, ĉar mi pensas, ke estas kanto ankaŭ en la okcitana, kaj krome eksterprograma ero, kies lingvon mi ne memoras. Ho ve, esperantisto ja devus kapabli, se ne paroli, almenaŭ ĝuste nombri lingvojn!

Ni aŭskultis komence la Orkestron de la Muzik-amantoj en Turku, unue en stiloj blugrasa kaj ril-danca kaj poste moderne aranĝitan version de la finna folkloro melodio “Isontalon Antti”. En la modernigita versio, kompreneble, la ĉefrolulo Andreo ne plu nomiĝas Antti, li estas nun grandmonde Andy.

Poste sekvis iom da finna nostalgio kun “Ĉe l’ bivaka fajro” (Rakovalkealla de Reino Helismaa), en prezento de Arja Lyly. Ŝia dua numero estis “Liftari ja lehmä” (Petveturanto kaj bovino de Jukka Perkoila).

Poste nin regalis la multkolora kaj multlingva (ŝi kantis en ĉiuj lingvoj, kiujn mi komence lis-



En la grupo “Muzikamantoj en Turku” violonas ankaŭ nia konata Tiina Oittinen, videbla live en la foto.

tigis) kanta repertuaro de Fransŭaz Roŝet, kun akordiono. Fine de la bela koncerto mi rimarkis, ke nur du kantoj en la tuta programo estis en la finna lingvo, kaj la duan el ili kantis Fransŭaz. – Ŝi venas el suda Francujo, jam pro tio konvenus nomi ŝin trobadorino, sed mi dubas antaŭ vortaraj difinoj de la vorto, do vi decidu mem, kiun titolon meritas nia kun-akordiona kanzonistino.

Ni aŭdis ankoraŭ belan valson pri la Aŭra rivero, kiu trafluas la urbon Turku. Ĝin emocie bele kantis Arja Lyly, Anna-Liisa Ali-Simola (ŝi esperantigis la tekston) kaj Merja Uotila. La plej aplaŭdata kanto de la tute vespero eble estis la lasta, kaj ne nur pro tio ke tiel eblis aplaŭdi sin mem (ni ĉiuj kantis kune).

Saturnaa, la Fabela Lando, estis dum jardekoj kaj plu estas unu el la plej multe ludataj muzikaĵoj en Finnlando. La Finnlanda organizaĵo de aŭtoraj rajtoj pri muziko (Teosto) kolektas pagojn por ĉio publike prezentata en la lando, kaj ĝiaj statistikoj el 2006 montras, ke Saturnaa estis la kvara. En 2000 kaj 2001 ĝi estis la dua. Aliajn jarojn mi ne studis. La tango, melodio kaj vortoj, venas de Unto Mononen (1930-1968; vivis en Somero), kiu eble verkis ĝin jam en 1949, sed la unua disko kun la melodio aperis en la 1955-a jaro.

Esperantigis la kanton Tuomo Grundström kies tekston mi donas ĉi-sube (eble li jure persekutos min pro rompo de aŭtora rajto).

Fabellando

*Sabla strando en la lando ie trans la mar'
sentas tuŝon, ŝaŭmopluŝon, kison de ondar'.
Floroj brilas, birdoj trilas tie ĉe aŭror'
ĉe l' marplaŭdo pri morgaŭo zorgoj estas for.*

*Ho, se mi povus flugi al la lando de fabel'
kaj tie resti, ĉiam nesti sub la bluĉiel',
sed nur senpova, terprizona, povra devas mi
sopiroplena, terkatena resti tie ĉi.*



Arja Lyly kantis, interalie, pri bivaka fajro ("Rakovalkealla" de Reino Helismaa), en esperantigo de Anna-Liisa Ali-Simola.

*Flugu kanto, mesaĝanto trans la horizont',
al amata, dezirata estu mia pont'.*

*Tien iru, dolĉe diru jenon nur de mi:
Miozoton, kordorloton rajtas sole ŝi.*

*Ho, se mi povus flugi al la lando de fabel'
kaj tie resti, ĉiam nesti sub la bluĉiel',
sed nur senpova, terprizona, povra devas mi
sopiroplena, terkatena resti tie ĉi.*



Post la koncerto mi iomete cerbumadis, kial ne pli grandnombre la turkuanoj partoprenis tiom ĝuindan vesperon.

Harri Laine

Fransŭaz en Tampere kiel gasto de Esperantosocieto Antaŭen

Fransŭaz Roŝet restis en Tampere ekde merkredo ĝis sabato (17.-20.9.). La unua vizito estis al supermerkato, kie ŝi lernis novajn finnajn vortojn de la varoj. Tie ŝi ekmemoris, ke iu konsilis ŝin gustumi mĉmmi. Feliĉe ni trovis ĝin frostita. Gustuminte ŝi tuj ŝatis mĉmmi kun kremo.

Ĵaŭde ni iomete butikumis en la urbo. Poste estis tempo por iom ekzerci por la vespera koncerto. Tiu okazis en la muziksalono de la malnova biblioteko. Dudeko da personoj, el kiuj plejparto estis esperantistoj, povis sekvi kun ŝi en la ĉarma veturo tra la mondo pere de varia-tipaj muzikpecoj kaj prezentmanieroj. La koncerto estis tradukita. Post la sukcesa koncerto ŝi povis pasigi la frunokton mem ĝuante finnan



forkloran muzikon en iu kunvenejo kun Anja (Karkiainen).

Vendrede antaŭtagmeze okazis vizito en la lernejo de Lentävänniemi. Tie 400 lernejanoj de la klasoj 1-6 surplanke sidante intensive aŭskultis Fransŭaz kaj aplaudis fervore. En la lerneja manĝejo ni povis konstati, ke la lerneja manĝo estas bonega.

Tutan tempon ŝi iris kun la finna-esperanta-finna vortaro en mano aŭ en sako por lerni novajn vortojn. En Tampere ŝia vera lernotemo estis finnaj verboj kune kun aliaj vortoj. Vendrede posttagmeze promenante en la parko Pyynikki ŝi flue klarigis al iu alparolanto "Minä en ymmärrä. Minä olen ranskalainen."

Sabate ŝi kunveturis kun ni al Heinola por partopreni Aŭtunajn Tagojn kaj koncerti tie.

Sylvia Hämäläinen



Pri la popolmuzika koncerto, kiun ni ĵaŭde ĉeestis kun Fransŭaz, mi aldonu, ke temis klub-vespero de "Rahvaanmusiikin kerho" en Telakka, kie muzikis du tre lertaj grupoj: Mateli (duo de Liisa Matveinen kaj Tellu Turkka) kun kalevaleca programo kaj humurplena ostrobotnia triopo Halogeeni, kies programo hazarde enhavis la saman "Kaffilaulu", kiun ankaŭ Fransŭaz kantas. El rekantaĵo de alia kanto Fransŭaz kaptis la frazon "Tää on kyllä liikaa", kiun ŝi poste plurfoje tre trafte uzis.

aldonis Anja Karkiainen

En la apuda bildo Fransŭaz koncertas dum la Aŭtunaj Tagoj en Heinola. (Foto: Päivi Saarinen)

Sukcesa koncerto en Pori

La folk-klubo de Pori sub gvido de Risto Kupari organizis koncerton dimanĉon, 14.09.2008 ekde la 18a horo en la kafejo de Satakunnan Museo.

Preskaŭ ĉiuj lokoj estis plenigitaj, kiam la ensemblo de Porin Pelimannit komencis la vesperon. Sekvis pli ol duonhora programo de Fransŭaz Roŝet de la grupo "Duoble Unu", kies koncerto "Tra la mondo" prezentis kanzonojn el diversaj landoj kaj en diversaj lingvoj, i.a. en la franca, jida, ladina, itala kaj eĉ ĉina. Paula Niinikorpi (krom esti gastiganto en Pori) tradukis la enkondukojn el Esperanto al la finna, dum la finlingvan kanton "Fabela lando" kunkantetis kelkaj el la publiko. La aŭskultantoj tre ŝatis la ĉarmajn melodiojn kaj vervan ludadon de Fransŭaz, ne mankis propono danci kun ŝi. Eĉ ne sufiĉis la kvanto da kunportitaj diskoj de ŝia unua KD "Sen lim' ĝis" – plena sukceso.

Post spontanea aldonata akordeona ludado de loka famulo la vespero finiĝis post du horoj, certe ankaŭ la alvenintaj gastoj ĝuis la eventon.

Robert Bogenschneider, Pori

Fransŭaz en Iisalmi kaj Vesanto

Post Aŭtunaj tagoj Fransŭaz vojaĝis al Iisalmi, kie okazis merkrede 24.9. koncerto en *Kuivurin tupa* en *Nerohvirta*, proksime de la bieno de Onni Kauppila. Dua koncerto okazis en loka lernejo, kie Fransŭaz povis montri de mapo la diversajn landojn, el kiuj ŝiaj kantoj venas.

De Iisalmi nia gasto vojaĝis al Vesanto por labori kun salikrikoltado ĉe la bieno de Kimmo Hakala kaj kompreneble daŭrigi la koncertan turneon tie. En Vesanto okazis entute kvar koncertoj. La ĉefa koncerto estis dimanĉe 28.9. en *Niiniveden nuorisoseuran talo* (junulara domo), kie ĉeestis 55 aŭskultantoj, inter ili esperantistoj el Jyväskylä klubo. Krome okazis koncertoj en vilaĝa lernejo de *Ahveninen* (al ĉ. 60 gelernantoj), en *suoramyntipiste Vestori* (merkata vendejo, dudeko de aŭskultantoj) kaj en *Vesannon hoiva- ja palvelutalo* (flegdomo por maljunuloj kaj handikapuloj).

*Laŭ informoj de Kimmo Hakala
skribis Tiina O.*

Eventokalendaro de EAF

2008

Zamenhof-tago en decembro 2008

2009

Marto 2009 Vintraj Tagoj en Kouvola regiono

22.-26.6.2009 Esperantokurso en Popola Instituto de Valamo, Heinävesi kun posta ekskurso al Valamo de Ladogo

25.7.-1.8.2009 Universala Kongreso de Esperanto, Bjalistoko, Pollando

Laborkunsidoj

Novembro 2008 Estraro

Afrodizia premio 2007

Dum FEJO-tendaro en Yyteri fejoanoj daŭrigis sian tradicion elekti la plej afrodizian kovrilpaĝan bildon inter la pasintjaraj numeroj de Esperanta Finnlando. Ĉi-foje la elekto estis malfacila kaj oni multe diskutis, sed finfine nomumon ricevis numero 5/2007, kies bildo estas fotita dum Aŭtunaj Tagoj de EAF en oktobro 2007.

estraro de FEJO



Aŭtunaj Tagoj en Heinola – Syyspäivät Heinolassa 20.-21.9.2008

Tridek kvin partoprenantoj povis ĝui du belegajn tagojn en Heinola. Re prezentantoj de la urbo bonege akceptis nin kaj donis al ni multflankan bildon de la urbo. Ĵurnalisto de la loka gazeto Itä-Häme intervjuis la prezidanton kaj nian gaston sabate, la artikoleto aperis komence de la sekva semajno.

En la komenco de la tagoj venis la vicĉefo de la urba oficistaro Terhi Mäkinieniemi saluti nin kaj rakonti pri la urbo. Tuomo Grundström interpetris esperante. Kiel dankon s-ino Mäkinieniemi ricevis por sia urbo la esperantlingvan Kalevala-libron.

Du urbajn muzeojn prezentis al ni muzea ĉefo Kari-Paavo Kokki. Speciale allogis nin en la urba muzeo la granda kolekto de diversaj medaloj el Finnlando kaj ekestis ideo donaci al la muzeo la medalon pri Vilho Setälä (plano por realigo estas dum ĉi-jara Zamenhof-tago). Afabla vizitcelo estis la plej malnova domo de Heinola, la tiama oficeja domo de provinca po-

licestro.

Vespere la partoprenantoj ĝuis la koncerton de Fransŭaz kaj kunkantis entuziasme la kantojn Kaffilaulu kaj Fabellando. Ĉeestis ankaŭ kelkaj lokaj vizitantoj, kiuj planis denove aktiviĝi kiel esperantistoj.

Dimanĉmatene la prezidanto Tuomo Grundström prelegis kaj diskutigis la partoprenantojn pri la temo Finnlanda kulturo en Esperantujo.

Atingis nin ankaŭ funebra mesaĝo: forpasis nia honora membro Vuokko Heinäsuo el Helsinko. La partoprenantoj respektis ŝian memoron kun silenta momento.

La rondveturo dimanĉe montris al ni la urbon kaj multe de la ĉirkaŭaĵo. Nia lerta ĉiĉerono nomiĝis Marja-Leena Ahtiainen, kiu kune kun ŝoforo de Savonlinja Oy gvidis nin du horojn. La fino de la rondveturo estis ĉe la famaj birdoj de Heinola kaj nia prezidanto fermis la tagojn en la buso. Post tio eblis vizito al la birdēja ĝardeno antaŭ hejmenveturo.

Legu impresojn de nia gasto kaj de AT-partoprenanto aliloke en tiu ĉi gazeto. Koran dankon al Fransŭaz kaj al Anja L. pri la kontribuoj.

Vintraj Tagoj 2009 en Kouvola-regiono

La estraro de EAF decidis aranĝi la venontjarajn Vintrajn Tagojn kun jarkunveno en marto en Kouvola aŭ en ĝia regiono. Dum la tagoj nia membroasocio Steleto, kiu fariĝos 90-jara en 2009, sin prezentos. En Kouvola-regiono loĝas kelkaj aktivaj membroj



Partoprenantoj en ĝardeno de la muzea domo.

de nia Asocio, kio helpos kun la aranĝo. La detalaj informoj pri loko kaj tempo aperos en sekva Esperantolehti kaj en nia retpaĝoj. Bonvenon!

Por la estraro raportis Tiina Oittinen

Aŭtunaj tagoj. Oraj horoj. Kulta aikatauko.

Poema teksteto de nia gasto, kiu dum sia vizito lernas ankaŭ nian lingvon

Per giganta ponte super lago (aŭ ĉu rivero?) kolektiĝas jam varma amikaro, **varmat ystävät**. Per lingva ponto ili interrilatas.

Afabla (kaj sperta kukkuiristo) ciceronas tra nuna urbo, ĝis la XVIIa jarcento, ĝis bela ligno-domo, kies murpaperoj estas gajaj kiel afrikaj tekstajoj.

Post plia promonado, plia babilado, vespermanĝo, alvenas ekirhoru de muzikvojaĝo tra la mondo. Milda etoso, kiom agrable estas kanti kore de amikaro. Denove babilado, franca ja (ĉu temas pri kajmani aŭ krokodili? Iu tia bestumado...) kun sperta poligloto, ili vere abundas en Esperantujo. Nokto plu iras tra serpenta koridoro ĝis improviza trinkejeto, super tio ŝvebas komplika silento, iam tiam traborita de tro laŭta rideksplodo.... Alvenis tempo de sonĝaj renkontoj.

Sunleviĝo blovetas super lago (ĉu rivero?), brumetoj flugetas laŭ rivero, (ĉu lago?). Jam flaviĝas foliaro, kristalere brilas akvo.

Matenmanĝo, bondeziroj, babilado. Alvoko de la kara paĉjo: kara onĉjo respondas, li scias kion bele diri. Babilado ĉesas, ridoj alfluas. Svarmas vortoj en aero: kiel konigi al la monda esperantistaro esencon kaj kulturon de nia kara fabellando? Vasta programo – vasta? ne nur...

Poste, kulta suno nun alvokas al plia irado laŭ lagorando; malemo al enbusiĝo kiam belvetaras. Laŭ paŝritmo, interkono, interŝanĝo, ktp... Tago ja tro rapide iras, pli rapide ol mia animo: jam estas horo adiaŭi, la ora libro fermiĝas, bra-

koj emocie ĉirkaŭbrakas, la vojo daŭras ĝis aliaj vialandaj paradizoj.

Via lando kie ne nur boacoj vagadas, sed ankaŭ franca spektaklofarantino, gaja vagulino, dankema vojaĝantino. **Iloinen kulkija, ranskalainen pelimanni**.

Elkoran dankon al EAF kaj ties estraranoj pro tiuj oraj tagoj.

Fransŭaz

Aŭtunaj tagoj el vidpunkto de partoprenanto

La kontentaj 35 partoprenintoj ĝuis, amuziĝis kaj konatiĝis kun urbo Heinola en la plej bela aŭtuna vetero. Salutojn de la urbo Heinola alportis s-ino Terhi Mäkinieni. Ĉar ĉeestis ankaŭ eksterlandaj partoprenantoj la prezidanto T. Grundström interpretis la prezenton esperante.

Post la kafo ni ekiris al muzeoj. Estis ĝojo promeni al la muzeoj, suno brilis, multkoloraj arboj, precipe aceroj, ardis kaj anasoj naĝadis en Kymi-rivero. La gvidanto surloke bone klarigis pri la Urba Muzeo kaj pri la domo de gubernia poliestro (lääninkivalteri) Aschan.

Vespere ni priĝuis vespermanĝon kaj la programon. Fransŭaz Rošet alportis kantante salutojn Tra la Mondo.

Dimanĉe post bona matenmanĝo en la Hotelo Kumpeli ni silentis kune al la matenpreĝo, kiun Olavi Kantele gvidis. Regis la sento ke ni vere estis spirite kune, ĉar ni kunlegis unuvoĉe la tekstojn.

Tuomo Grundström altraktis en sia prelego naciecojn, barojn kaj komunecon. Kaj li gvidis ege interesan serĉon por trovi el Finnlanda kulturo perlojn kiujn ni esperantistoj volus prezenti al la mondo.

Post bongusta kaj abunda lunĉo ni rondveturis en Heinola kun loka ĉiĉeronino.

Kore mi dankas ĉiujn aranĝintojn pro la ĝuindaj Aŭtunaj Tagoj.

Anja Launiainen el Kaarina

UEA atentigis UN

Universala Esperanto-Asocio estis invitita prezenti al la Homrajta Konsilio de UN deklaron pri sia starpunkto en afero, kiun ĝi trovas grava. UEA havas la rajton sciigi siajn starpunktojn ankaŭ al tiu grava organo de Unuiĝintaj Nacioj pro sia oficiala statuso de Neregistara Organizaĵo en specialaj konsultaj rilatoj kun la monda organizaĵo. La aktuala deklaro de UEA estis submetita al la 9-a sesio de la Homrajta Konsilio en Ĝenevo (8-26 septembro) en la angla, franca kaj hispana lingvoj. Ĉi-sube ĝiaj ĉefpunktoj en Esperanto.

La starpunkto de UEA pri lingvaj rajtoj

La rajto de infanoj lerni sian gepatran lingvon kaj daŭrigi sian edukadon uzante sian gepatran lingvon, ne nur estas grava por ilia kulturo; ĝi estas fundamenta por ilia psika evoluo. Pluraj larĝskalaj studoj en multaj diversaj landoj demonstris, ke se indiĝenaj kaj minoritataj infanoj estas edukataj ĉefe uzante ilian gepatran lingvon en la instruado dum la unuaj 6-8 jaroj (kun samtempa, bona instruado de la reganta lingvo

kiel dua lingvo, fare de dulingvaj instruistoj), iliaj ĝeneralaj lern-atingoj estas pli bonaj. Krome, ili lernas la regantan lingvon pli bone ol se ilia instruado okazus per la reganta lingvo.

Ankaŭ gravas, ke la homoj kapablu komuniki je diversaj niveloj. UEA apogas lernadon de 2, 3 aŭ 4 lingvoj, laŭ la cirkonstancoj, t.e.

1. la gepatran lingvon,
2. la regionan lingvon, se ĝi estas malsama,
3. la nacian lingvon, se malsama ol la du unuaj,
4. internacian lingvon, kiu apartenas al neniu nacio – nome Esperanto.

Esperantistoj scias, ke kiam multnacia grupo uzas unu neŭtralan, komunan lingvon, la kvalito de la komunikado estas ege specifa. La fina celo de Esperanto estas antaŭenigi pacon inter popoloj igante la komunikadon pli facila kaj pli justa. Uzo de komuna lingvo evitigas situacion, en kiu homoj uzantaj sian gepatran lingvon havas grandegan avantaĝon super la aliaj.

(el komunikado de UEA koncizigis mm)

Invito al Salo sabate 8.11.2008

Esperantoklubo de Salo invitas reprezentantojn de EAF kaj ĉiuj ties membrosocietoj al 30-jara festo en kafejo Ora Odoro (Kultainen Tuoksu, Inkerinkatu 22, Salo) la 8an de novembro. Ĉiuj esperantistoj kun amikoj estas bonvenaj.

Taga festo (16-18) estas dulingva (eo, fi) kaj enhavas salutvortojn de la prezidanto Matti Wallius, prelegon de Carola Antskog pri similecoj inter esperanta kaj finna lingvoj, memorojn de la tuta estraro, muzikon de Johan Puumala kaj aliaj netajn programerojn. Kompreneble ankaŭ kafo kun kuko!

Vespera festo (19-??) kun bongusta manĝaĵo, pli da programo kaj liberaj vortoj. Johan muzi-

kas kaj dancamantoj dancu!

La taga festo estas senkosta. Al ĝi estas invititaj ankaŭ lokaj neesperantistaj gastoj. Al la vespera festo la klubo invitas senpage unu reprezentanton de ĉiu asocio, ankaŭ el Nordio. Pliaj partoprenantoj rajtas veni pagante po 30 eŭrojn al la konto 243635-801. Vi povas lige al la pago skribi kiuj partoprenos de via asocio aŭ aliĝi per retroŝto al cantskog@kolumbus.fi aŭ telefone 050-5817272. Ni volas ĝis la 24a oktobro ankaŭ scii kiom da personoj partoprenos al la taga festo.

Bonvenojn!

Estraro de Esperantoklubo de Salo

Finiĝis erao de respondkuponoj

Dum multaj jardekoj UEA akceptis pagojn per internaciaj respondkuponoj. Ili estis simpla pagmaniero, kiam internaciaj monĝiroj per banko aŭ poŝtmandato estis malfacile fareblaj kaj subigitaj al diversaj limigoj aŭ eĉ ne permesitaj al privatuloj. Lastatempe ilia uzado maloftiĝis, ĉar internaciaj pagoj fariĝis pli facilaj dank' al la forigo aŭ mildigo de limigoj kaj pro disvastiĝo de kreditkartoj kaj de retaj pagmanieroj.

Antaŭe la Centra Oficejo povis facile ŝanĝi la kuponojn en poŝtmarkojn en sia kutima poŝtejo. Nuntempe la poŝtejo ne plu akceptas ilin, kaj ĉi-jare nur per escepta aranĝo la poŝta entrepreno TNT konsentis akcepti de UEA, por la lasta fojo, kvanton da kuponoj. Ankaŭ en multaj aliaj landoj internaciaj respondkuponoj ne plu estas vendataj nek akceptataj.

UEA ne plu akceptas internaciajn respondkuponojn kiel pagilojn por kotizoj aŭ servoj nek por aldoni bonhavan al UEA-kontoj.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

Novembre Malferma Tago de UEA

Andy Künzli el Svislando kaj Alejandro Cossavella el Argentino estos la ĉefaj gastoj en la 29-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA, kiu okazos sabaton, la 29-an de novembro. Andy Künzli ricevis en la ĉi-jara UK la Premion Grabowski pro sia impona enciklopedia verko Universalaj lingvoj en Svislando. En la programo estos prezento de lia verko kaj du prelegoj. La kantisto-gitaristo Alejandro Cossavella kontribuis al la Malferma Tago unuafoje en aprilo 1998, kaj en la sama jaro li ekfamigis en Esperantujo pro gajni la ĉefpremion de la Belartaj Konkursoj. Intertempe lia muziko aperis ankaŭ en kompaktaĵoj.

Estos ankaŭ aliaj prelegoj, libroprezentadoj kaj filmoj. La vizitantoj povos profiti de rabatoj en la libroservo kaj gajni esperantaĵojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon de la 10-a ĝis la 17-a horo.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

Ses libronovaĵoj

Dum la 93-a UK en Roterdamo la Eldona Fakoj de UEA prezentis kvin tute novajn librojn kaj unu reelondon. La jubileo de UEA kaj la okazigo de la UK en ĝia hejmurbo katalizis pli multnombrian samtempan lanĉon de novaĵoj ol kutime.

Okaze de la 100-jariĝo de Universala Esperanto-Asocio aperis *Utila Estas Aliĝo*, 126-paĝa abunde ilustrita libro de la renoma movada historiisto Ulrich Lins. (Prezo: 15,00 EUR). Humphrey Tonkin verkis libron *Tuj apude*, 56-paĝan gvidilon pri la najbaraĵo de la Centra Oficejo en Roterdamo. (Prezo: 7,50 EUR). Louis Couperus (1863-1923) estas nederlanda verkisto, kiu ĝuis ankaŭ internacian famon komence de la 20-a jarcento. Lastatempe li estis remalkovrita, ankaŭ al Esperanto, kaj la eldonejo Kava-Pech lanĉis lian romanon *Fatalo* kaj UEA mem reprezentan kolekton de rakontoj titolitan *Pri vagabondoj kaj friponoj, pri damoj kaj kavaliroj*. (Prezo: 9,90 EUR). En *Naturaj vortordoj en Esperanto* Wim Jansen, estro de la katedro pri interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo, resumas temojn de sia doktora disertacio. (Prezo: 4,50 EUR.) La kajero *Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA* estis de longe nehavebla, sed dum la UK surmerkatiĝis ĝia tria eldono, 39-paĝa kaj funde reviziita. (Prezo: 4,50 EUR.) La 115-paĝa kajero *Internacia Kongresa Universitato 2008* enhavas la tekstojn de ĉiuj prelegoj de la 61-a sesio de IKU (Prezo: 15,00 EUR).

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

Valamo kursosemajno

22.-26.6.2009 – 10a jubilea kurso

Venontjare estos la 10a sinsekva kursosemajno de Esperanto en la Popola Instituto de Valamo, aranĝota kunlabore kun la Instituto kaj Esperanto-Asocio de Finnlando. La instruisto estos denove Atilio Orellana Rojas kaj – ĉar ni kompreneble supozas ke al la jubilea kurso venos multaj kursanoj – Patrik Austin estos la finlingva instruisto. Kiel kursogvidanto kaj tria instruisto agos kiel jam kutime Tiina Oittinen.

Ni invitas ĉiujn, kiuj dum la dek kursojaroj iam vizitis Esperantokurson en Valamo, veni denove al la mirinda monaĥeja atmosfero. Kaj nature same bonvenaj estas novaj kursanoj por ĝui la multflankan instruadon kaj la belan pejzaĝon. La kurso okazos tuj post la mezsomera semajnfino kaj kiel antaŭe eblas alveno jam dimanĉe vespere.

La kursosemajno havos jam multajn tradiciajn kutimojn kaj programerojn, sed ĉiu kurso estas unika kaj formiĝos laŭ siaj partoprenantoj. Vi estas bonvena proponi temojn por pritraktado dum la kurso.

Prezo de la kursosemajno estos inter 198 kaj 260 eŭrojn depende de la tranoktado. Se vi parolas la finnan, vi povos aliĝi rekte al la Popola instituto. Bonvolu informi ankaŭ al ni instruistoj pri via aliĝo, ĉar por la kursoplanado necesas scioj pri la kursanoj.

Kontaktulo estas kursogvidanto Tiina Oittinen, sekretario de EAF, adreso: Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku, Finnlando, tel: 02-2305319, eafsekretario@esperanto.fi. Pliaj informoj ankaŭ en www.esperanto.fi

Valamon kymmenes esperantokurssi 22.-26.6.2009

Ensi kesän esperantokurssi on jo kymmenes, jonka Valamon kansanopisto ja Suomen Esperantoliitto järjestävät yhteistyössä. Opettajana on jälleen mainio Atilio Orellana Rojas. Juhlakurssille odotamme tietysti runsasta osaanottoa, siksi suomenkieliseksi opettajaksi tulee kuten viime vuonna Patrik Austin. Kurssivastaavana ja kolmantena opettajana on taas Tiina Oittinen.

Kutsumme juhluvuonna mukaan ne kaikki, jotka jonakin aikaisempana vuonna ovat osallistuneet Valamon esperantokurssille. Luonnollisesti myös uudet kurssilaiset ovat yhtä tervetulleita luostarin ihmeelliseen ilmapiiriin nauttimaan monipuolisesta opetuksesta ja kauniista luonnosta. Kurssi on heti juhannuksen jälkeisellä viikolla ja Valamoon voi saapua lisäksi jo sunnuntaina.

Kymmenen vuoden aikana kurssiviikolle

on muodostunut jo useita perinteitä, mutta jokainen kurssi on ainutlaatuinen ja muodostuu oppilaittensa näköiseksi. Voit hyvin ehdottaa meille aiheita, joita kurssilla käsiteltäisiin.

Viiden päivän kurssin hinta on 198–260 e majoituksesta riippuen. Suomea osaavat voivat ilmoittautua suoraan Valamoon. Ilmoita kuitenkin myös meille opettajille, että olet tulossa, se on tarpeen kurssin suunnittelussa. Kurssin yhteyshenkilö on kurssivastaava ja liiton sihteeri Tiina Oittinen (yhteystiedot lehden sivulla 2).

Yhteystiedot Valamoon: Valamon kansanopisto, Valamontie 42, 79850 Uusi-Valamo, puhelin myyntipalveluun 017-570 1810, sähköposti: opisto@valamo.fi. Esperantoliiton nettisivuilla www.esperanto.fi on nähtävissä lisätietoa kurssista sekä linkki Valamon sivulle www.valamo.fi.



Foto: Katja Malisheva

Kursovizito kaj ekskurso tuj post la kurso

Ankaŭ venontjare eblas viziti la kurson en Valamo dum la du lastaj kursotagoj kaj partopreni ĵaŭde en festa vespero kun manĝo en loka stilo. Vendrede ekveturas 3-taga ekskurso vojaĝo al la insulo Valamo sur la lago Ladogo, Rusio, kie hodiaŭ denove funkcias monaĥejo. Pliaj informoj de la kursogvidanto.

Vierailu kurssille ja retki Laatokan Valamoon

Myös ensi vuonna on mahdollista vierailla kursilla ja osallistua torstaina kurssin juhlavaan päätösillalliseen. Kurssin päätteeksi on suunnitteilla retki Laatokan Valamoon, jossa jälleen toimii luostari. Lisätietoja kurssivastaavalta.

Bonvenon!

Tiina kun Atilio kaj Patrik

Esperanton opiskelua luostarimiljöössä

Osallistuimme viime kesänä 23.6-27.6 2008 pidetylle esperanton kurssille Valamossa. Puitteet opiskelulle olivat mitä parhaimmat ja eläminen tunnelmallisessa luostarimiljöössä oli puhutteleva kokemus. Kurssimme alkajaisiksi luostarin vapaaehtoistyöntekijä Jukka Laaksonen esitteli meille Valamon luostaria esperantoksi ja suomeksi. Hän puhui esperantoa sujuvan selkeästi ja sekin omalta osaltaan kannusti meitä kielen opiskeluun.

Olimme ennen Valamon kurssia käyneet vuoden ajan esperantotunneilla Auralan kansalaisopistossa ja siksi meidät sijoitettiin keskustalon ryhmään, johon tuli kahdeksan innokasta oppilasta. Mukava ryhmähenki syntyi heti. Joukossamme oli kolme näkövammaista henkilöä. Ihailimme miten näppärästi he käyttivät ▷

esperantonkielisiä pistekirjoitusoppikirjojaan. Kurssilla oli myös ulkomaalaisia opiskelijoita Virosta, Venäjältä ja Ruotsista. Oli elämys kommunikoida heidän kanssaan esperantoksi, vaikkakin se meiltä kävi vielä änkyttäen ja sanoja hakien.

Kurssin kolme opettajaa Atilio Orellana Rojas, Patrik Austin ja Tiina Oittinen olivat erittäin ammattitaitoisia. Opetus oli hauskaa ja käytännönläheistä. Hyvä idea oli, että kaikki opettajat opettivat jokaista ryhmää vuoronperään.

Kurssiviikon aikana vierailimme Valamon luostarin tunnelmallisella hautausmaalla. Jukka Laaksonen kertoi esperanton ja suomen kielellä mielenkiintoisia tarinoita sinne haudatuista vainajista sekä valisti meitä myös ortodoksisen uskonnon olemuksesta. Yhtenä päivänä teimme vielä vaelluksen matkamiehen ristille, joka sijaitsee Juojärven rannalla. Meille kerrottiin muistomerkin mielenkiintoisesta historiasta ja joiimme kahvit luonnon helmassa kirkasvetisen Juojärven aavaa ulappaa katsellen.

Iltaisin oli mukavaa ohjelmaa kuten saunomista rantasaunassa, haitarinsoittoa ja yhteislaulua – tietenkin esperantoksi. Kurssin lopuksi pidettiin banketti, jossa söimme luostarin keittiön juhlaruokia ja kuuntelimme musiikkiesityksiä.

Päätöspäivänä saimme todisteen edistymisestäämme: puolalainen Terese Nemere piti esitelmän puolalaisista Torunin piparkakuista ja me ymmärsimme esperantonkielisen esityksen vaikeuksista!

Valamon esperantokurssista meille jäi paljon mukavia muistoja. Päätimmekin osallistua kurssille myös ensi kesänä. Ehkä edistymme Auralan Kansanopiston esperantotunneilla siinä määrin, että meidät kelpuutetaan silloin jo keskusteluryhmään.

Kiitos vielä kerran esperantokurssin järjestäjille!

Eeva ja Jukka Nikoskelainen



Kuva: Jukka Nikoskelainen

Esperantogvidanto en Tampereoj kaj vojaĝo en Sankt-Peterburgo

Du magazinoj skribis pri esperantistoj. *Kemia–Kemi* -magazino 4/2008 rakontis pri Sirpa Kauppila kaj la Universala Kongreso de Esperanto en Tampereoj, kie Sirpa estis vojaĝgvidanto en jaro 1995. En *Kajastus*-magazino 3/2008 Raita Pyhälä skribis pri vojaĝo de finnaj esperantistoj en Sankt-Peterburgo.

Kemia–Kemi -magazino estas profesiomagazino por kemiistoj kaj membromagazino de Kemia Societo de Finnlando kaj ankaŭ Societo Biobio, scienca societo. *Kajastus* estas kulturmagazino por blinduloj.

Kemia–Kemi havas artikoloserion "Kemistin kääntöpuoli". En tiuj ĉi artikoloj magazino prezentas la duajn profesiojn de kemiistoj aŭ iliajn nekutimajn hobiajn. Sirpa Kauppila estas kemiisto kaj vojaĝgvidanto estas ŝia dua profesio. Tion ŝi akiris erare.

Sirpa diras, ke kulmino de ŝia gvidokariero estas laboro dum la UK en Tampereoj 1995. Ŝi lernis dum tri jaroj Esperanton kun kelkaj aliaj gvidistoj. La tuta akompana programo de kongreso fariĝis en Esperanto. Krozadoj sur lagoj, rondveturoj kaj vesperaj solenaĵoj aranĝiĝis en Esperanto. Kiam esperantistoj en buso en Tampereoj komprenis, ke gvidisto parolas esperanton, ili estis tre surprizitaj. Gvidisto, kiu parolas esperanton! Neniu atendis tion kaj neniu travivis tion en aliaj kongresoj. Ĉiuj vojaĝantoj estas dankemaj al gvidisto, sed en tiu fojo la dankemo estis vere kolosa. Leterojn kaj kartojn en Esperanto mi ricevis dum multaj jaroj post la kongreso el la tuta mondo, diris Sirpa Kauppila. Sed post tio neniu abonis gvidadon en Esperanto.

Esperantistoj en Sankt-Peterburgo

Esperantistoj el Finnlando vizitis Sankt-Peterburgon en la pasinta vintro. En grupo estis partoprenantoj el Steleto, el Esperantoklubo de Helsinko kaj kelkaj aliaj esperantistoj. Esperantistoj de Sankt-Peterburgo vizitis en Finnlando en jaro 2006 kaj nun finnoj iris tien.

Unue gastigantoj aranĝis programon al finnoj en Shelgunov-kulturopalaco. Ni konatiĝis kun muzeo de blinduloj. Post la muzeo sekvis altnivela vespero kun bona programo. Unue finnoj petis prezenti sin en Esperanto. En programo estis multe da muziko, kantoj kun gitaroj kaj harmoniko kaj ankaŭ deklamoj de poemoj. Ni aŭdis finnajn kantojn. Tamara Andrejeva rakontis anekdoton pri novaj botoj. Tamara partoprenis en la universala kongreso de blinduloj en Onnela 1995. Fine Vladimir Kosre kantis kelkajn kantojn en angla lingvo, en franca lingvo kaj en Esperanto.

Steleto kaj Esperantoklubo de Helsinko donis al blinduloj de Sankt-Peterburgo reliefo-terglobon. Kiam oni palpas terglobon, oni povas pensi, kiel esperanto stermiĝis en la mondo. Rusaj gastigantoj donis al finnoj diskon kun rusaj kantoj en esperanto.

Ni aŭdis, ke en Sankt-Peterburgo estas Base Camp -loĝejo, kie oni povas paroli esperanton. En la fino esperantistogrupo konatiĝis ankaŭ kun la aliaj vidindaĵoj de Sankt-Peterburgo kaj partoprenis rondveturon de la urbo.

Jukka Noponen

PS. La loka ĵurnalo *Laitilan Sanomat* aperigis simpatian artikolon kun fotoj pri la lerneja koncerto de Fransŭaz al 400 geknaboj 15.9.

Okazis FEJO-tendaro en Yyteri, Pori

Inter 22-a kaj 24-a de aŭgusto 10 personoj sekvis la alvokon de FEJO al tendaro en urbo Pori, kiu celebras ĉi-jare sian 450-jariĝon. Pli detale ni estis en kampadejo de Yyteri, kiu estas konata pro sia nature valora kaj unika ĉemara duna plaĝo.

Kondiĉoj por aranĝi tendaron estis bonegaj. La partoprenantoj povis elekti inter naturproksima tendo kaj komforta dometo, kie estis ĉiuj bezonataj ekipaĵoj kaj eĉ saŭno. Saŭnumado kaj naĝado en maro estis ja grava parto de nia tendaro. Vendrede vespere okazis eĉ ekzotika noktomeza naĝado en la iomete freŝa maro dum nur luno donis lumon al ni. Ĉiuj ĝuis la unikan etoson kaj la lastajn eblecojn naĝi dum finiĝanta somero.

Kiel decas por tendaro, okazis ankaŭ rostado. Ĉiuj tagmanĝoj estis pretigitaj sur fajro kaj malgraŭ kelkaj plenbruligitaj kolbasoj ni sukcesis krei sufiĉe altkvalitan kaj eĉ bongustan menuon. Alia komuna allogaĵo estis minigolfo. Ni ludis en du teamoj, kiuj bonhumore batalis pri venko. Finfine pli sukcesa teamo gajnis kaj ricevis aplaudon. Kiel plian programeron ni spektis premiere kelkajn el la tre amuzaj epizodoj de “Ŝafo Ŝaŭn” (brita animacia serio “Shaun the Sheep”, en Finnlando konata kiel Late Lammas). La filmetoj estis projekciitaj sur la muron de nia dometo kvazaŭ en kinejo. Dum la semajnfino fejoanoj daŭrigis sian tradicion elekti la plej afrodizian kovrilpaĝan bildon inter la pasintjaraj numeroj de Esperanta Finnlando.

Dankon al ĉiuj kontribuintoj kaj venintoj, ke iĝis agrabla finsomera renkontiĝo!

Paula Niinikorpi



Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon:

Ilkka Santtila, Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@welho.com.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ www.esperanto.fi/helsinki jukka.p@esperanto.fi (Jukka Pietiläinen)
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 onni.kauppinen@pp.inet.fi
- Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen) Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 040 867 2743 www.esperanto.fi/jyvaskyla
- Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. martti.pennanen@phnet.fi
- Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Olli Pajula), Salamakuja 4 as 2, 90420 Oulu. <http://esperantooulu.info/> olli.pajula@baanamail.fi
- Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla matti.wallius@ebaana.net
- Esperantoseura Antaüen ry. / Esperantosocieto Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 5245 823 tapani.aarne@mbnet.fi)
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. tiina.oittinen@pp.inet.fi
- Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Brokärsvägen 89, 25700 Kimi-to. cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 445023-283606
- Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. fejo@esperanto.fi. Tilinro: 563000-2213606

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 12 e tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Hämeenlinnan esperantistien yhteystiedot: Verda Kastelo / Markku Sarastamo, Linnan kasarmi. Kenraalin talo. 13100 Hämeenlinna. sarastamo@gmail.com

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta, aktiivisia harrastajia on mm. Mikkelissä, Raumalla ja Taivalkoskella.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna

aperas dum la jaro

2008

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
6	10.11.	15.11.	5.12.
1	10.1.	15.1.	5.2.2009
2	10.3.	15.3.	5.4.2009

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezroj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro: Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e 1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e 1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e 1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: eaflehti@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.



Kuva: Kalle Kniivilä

Liettuan Vilnassa oli 26.-30.5.2008 kansainvälinen esperantolehdistökongressi. Siihen osallistui 180 esperantolehdistötekijää ja -järjestöjen aktiivia, ja myös esperantoa työssään käyttäviä journalisteja ja muuta ammattiväkeä. Tohtori Jukka Pietiläinen Helsingin Aleksanteri-instituutista luennoi aiheista “Kansainvälisen journalismin ajankohtaiset haasteet” sekä “Lehdistön itsesäätely ja etiikka”. – Kongressia isännöi ja sen kuluista vastasi Liettuan hallitus ja Vilnan kaupunki.

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy joulukuussa. Jutut 15.11.2008 mennessä EAF:n toimistoon. La venonta numero aperos en decembro. Artikoloj ĝis 15.11.2008 al la oficejo de EAF. Osoite/adreso: Siltasaa-renkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh/tel. (09) 715 538, s-posti/rete: <eafgazeto@esperanto.fi>.

Kopio Niini/Cityoffset, Tampere 2008